

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.  
Semajna esperantista ĵurnalo, aperos post 1 decembro 1924 dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate).

### Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gilli Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank- kaj fabri-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 220**  
**30. 11. 1924**

### Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Buffin, L. K.

### Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo ponumera  
de duonsemajna ekspedado: egal-  
valoro de 0.20 sv. fr., mendita per  
loka poŝtoficejo 0.15 sv. fr.;  
de semajna ekspedado (du numeroj  
kune): 0.15 sv. fr.

Anoncprezio  
po unucentmetra kolonero egalvaloro  
de 2.— sv. fr. (antaŭpage 1.50 sv. fr.),  
minimuma alteco 5 cm.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

## Grava sukceso de nia XVI-a en Wien.

### 450 posten-havantoj en Wien partoprenas esp. kursojn.

La 30000 posten-havantoj de la urbego Wien (oficistoj, instruistoj kaj la aliaj oficuloj) estas kunligitaj per granda Ligo, per kies monate aperanta grandformata ligo-gazeto „La urba posten-havanto“ la magistrata supera revizoro Rudolf Michael Frey vokis la urban posten-havantojn al du de li gvidotaj esp. kursoj. La ligestraro subtenis lian penadon per sia supre citita oficiala organo kaj obligis la kursojn en sia kunvenĉambrego. Definitive anoncis sin kontraŭ ĉies komenca opinio 450 personoj. Tiu ĉi amaso devigis la invitinton aranĝi kelkajn kursojn. Du el ili estas gvidataj de s-o bankoficisto Rajmund Čech kaj de s-o burĝernejredaktoro Josef Feder, al kiuj ni ĉi tie publike kore dankas.

La kursoj komencis la 17 oktobro. La ĉefurbestro Seif, iama instruisto, oficiale sendis leteron, per kiu li senkulpegis sin, ke li pro grava kunsido ne povas veni. S-o Frey malfermis per klarigaj vortoj (pri la signifo kaj historio de Esperanto ktp.); li diris pri la programo de la ekestanta „Esp. Organizo de la Posten-havantoj de Urbo Wien“ jenajn gravajn vortojn:

„Ke Esperanto estas lingvo vivanta, tion spertis aŭ almenaŭ povis senti, kiu partoprenis la grandiozan XVI-an Esperanto-kongreson okazintan ĉi tie en aŭgusto nunjara.

Enkonduke mi informis vin jam pri la rezolucio de la Ligo de Nacioj dirante ankaŭ, ke ĝi plene valoros nur, se la publiko — do ankaŭ ni ĉiuj — kunlaboros.

La esp. movado nuntempe ne plu estas haltigbla. Ĝi progresas daŭre pro la konata pli-ampleksiĝo de l' interkomunikiloj, precipe de la senfadena telefono. Ni nur ne scias, kiam Esperanto ĉie estos enkondukita kiel praktika interkomprenigilo, ĉu post 5 aŭ post 20 jaroj. Ĉar tio dependos ĉefe de pli-malpli baldaŭa partopreno de organizoj, de homoj kapablantaj influu laŭcele kaj la popolamasojn kaj la rondojn gvidantajn.

Cu tio baldaŭ okazos, tio dependas de ni! Precipe la urboj tre interesigas por senplende okazanta fremdul-frekvento. Se organizoj de komunumaj posten-havantoj en ĉiuj urboj de la mondo kunlaboros — kion ili certe faros vidante energian celkonscian centron gvidantan, — kaj kiam la nombro de vojaĝantoj pronogocaj kaj proplezuraj spertos, ke la lingvoproblemo estas solvata ĉiuloke sur sama bazo, ke oni povas komprenigi sin en ĉiuj urboj — ĉiulande per unu lingvo, tiam la homoj lernos Esperanton milionnombre kaj post 5—8 jaroj estos memkompreneblaj, ke ĉiu infano devos lerni la helplingvon kaj — volonte ĝin lernos.

Ni do formu »Esperanto-Organizon de la Posten-havantoj de Urbo Wien«! Tiu ĉi estu interligonta sin per la diversaj UEA-delegitoj kaj esp. organizoj en ĉiuj urboj kun la tieaj grupoj de l' komunumaj posten-havantoj ĉie fondotaj. Ĉiuj ĉi grupoj (aŭ societoj) unuigitaj al ligo devos ĉiuforte influu la diverslokajn societojn por komerco kaj trafiko, por ke Esperanto baldaŭ estu ĉie enkondukata. Precipe ja la urbaj oficistoj ktp. havas la plej taŭgajn oficialajn rilatojn al komerc- kaj trafikinstiutoj.

Ju pli energie do kaj senlace ni kuneagos en tiu direkto, ju pli baldaŭ potenco faktoro, kia estas la gvidantero de la milion-urbego Wien, samcelos plenaŭtoritate, des pli rapide la dezirata rezulto estos atingata. Precipe Wien, favorsitua inter diverslingvaj popoloj, komercurbo internacia, ŝatata en eksterlando, Wien baldaŭ povos tion atingi.

Ni do eklaboru! Per unuigitaj fortoj ni proserpigis certe tiun grandiozan kulturtaskon!

La sukceso de tiuj vortoj estis kontentiga: Ni nun jam havas „Laborkomiton“ de la „Esperanto-Organizo de la Posten-havantoj de Urbo Wien“, kiu efektive laboras kaj bone funkcias. Ĝi preparas esp. kursojn por la sekvontaj monatoj en la diversaj distriktoj de Wien kaj ekinterligas kun la ĉi tieaj gravaj organizoj por komerco kaj trafiko (ankaŭ kun la diversaj ministerioj) kaj per la esp. rondoj kun la urbaj posten-havantoj en ĉiuj landoj de la mondo. Ĝi konsistas el ĉ. 35 personoj kaj kunvenas regule monate unufoje, la estraro (12 p.) kunsidas ĉiusemajne 1—2 foje.

Jen la nomoj de la „Laborkomitato“, kiu estas kunmetita el plej diversaj rondoj de la urbaj posten-havantoj de Wien:

Albrecht Theodor, instr.  
D-o Bednar Johann, sup. mag. konsilisto  
Bernfeld Erwin Gerhard, ing.  
Benirschke Elise, instruistino  
Böhm Heinrich, sup. adm. komisarior  
Dr. Domonkos Liane, univ. asistino, fak-instruistino  
Eßberger Franz, sup. oficisto  
Feder Josef, burĝlern. dir.  
Föllner Josef, instr.  
Frey Rudolf Michael, sup. kalk. revizoro  
Göggel Josef, sup. adm. kom.  
Gottwald Willy, urba dung.  
D-o Gröll, senata kons., jur. kons. de Esp.-Org. de la Posten-hav. de Urbo Wien  
Grohmann Magarete, f-lino, sup. of.  
Grohmann Hermine, burĝlern. dir. vivdino  
Harm Emmy, f-lino, urba oficistino  
D-o Hartl Josef, magistrata konsilisto  
Hellwich Emma, urba oficistino  
Hellwich Othmar, studento  
Humborsky Mizzi, f-lino, urba oficistino  
Jirka Marie, f-lino, instr.  
Kassal Karl, instr.  
Kloiber Johann, lernejestro  
Koschatko Gustav, sup. kalk. reviz.  
Koschatko, s-ino  
Leiner Franz, urba bindisto  
Melber Friß, urba san. reviz.  
Mair Albert, burĝlern. instr.  
Müller Anton, adm. sekr.  
Ing. Rumler Reinhold, centr. insp.  
Schild Karl, sup. adm. kom., redaktoro de „Urba Posten-havanto.“  
Satra Augustin, urba tramv.  
Steidl Florentine, urba vartistino  
Siruska Hans, pop. lern. dir.  
Zakrzewska Luise, urba vartistino.

Jen la nomoj de la estraro elektita el la „Laborkomitato“: prez: Frey, D-o Domonkos, D-o Bednar, Satra; sek: Ing. Bernfeld, Kloiber, Hellwich, Jirka; kas.: Müller, Koschatko, Kassal, Siruska, inter ili 5 ĝeinstruistoj.

La estraranoj estas decidrajtigataj, la aliaj LK-anoj konsilantaj. — Grava estas la fakto, ke la redaktoro de la monata fakrevuo de la urbaj posten-havantoj ankaŭ aliĝis. Pro tio ni povis en la nuna novembro numero per tre longa artikolo, kiu ankaŭ entenas la supran program-paroladon, detale sciigi ĉiujn urban oficistojn, instruistojn ktp. pri la nuna vere ĝojiga stato de la esp. movado ĉe la komunumaj posten-havantoj.

**Alvoko al la UEA-delegitoj de ĉiuj urboj sur la tuta terĝlobo!**

Ni turnas nin al vi kun la urĝa peto: Bonvolu nepre baldaŭ interrilatiĝi nin kun la urbaj posten-havantoj en via urbo! Estas tre necese, ke ni urbaj posten-havantoj de ĉiuj landoj jam havu specialajn kunsidojn okaze de nia XVII-a en Genève, por preparoli la efikplenan kunigon de

niaj fortoj en ĉiuj komunumoj de la mondo. Bonvolu pro tio ruz mem aranĝi esp. kursojn por la urbaj posten-havantoj aŭ igi ilin aranĝi per aliaj esperantistoj!

La Laborkomitato de „Esperanto-organizo de la Posten-havantoj de Urbo Wien“  
Wien I, Rathausstraße 9, Mezzanin.

### Universala Esperantista Pacifista Ligo.

Pacifistoj! Subtenu tre energie la laboron de la wienaj urbaj posten-havantoj! Ju pli granda estas la sukceso ĉe ĉiuj urbaj komunumoj, des pli facile ankaŭ ni esp. pacifistoj konvinkos la pacifistaron tutmondan, ke Esperanto vere taŭgas kiel ununura mondhelpingvo. Ĉe la 23-a Mond-Pac-Kongreso dum la pasinta oktobro en Berlino la oficiala reprezentanto de UEP.L direktoro Gülich tre energie laboris por nia afero (vidu ET 2161), sed li ne povis atingi la deziritan sukceson, ĉar la pacifistaro ankoraŭ dubis pri la finfina venko de Esperanto. Ni montru al ili kaj pruvu, ke ĉi tiu dubo absolute ne estas prava! Kunlaboru kaj jen la fakto, ke nur Esperanto povas esti la mond helpingvo!

Rudolf Michael Frey, ĝeneralsekretario de UEP.L,  
Wien III, Reichardgasse 14.

## La Asocio Descartes enketis pri Esperanto.

Post la sukcesoj, pri kiuj mi raportis en mia antaŭa artikolo, nova kaj reala sukceso sekvis. Grava asocio de komerca kaj industria organizadoj, la Asocio Descartes en Paris, enketis pri la aplikado de Esperanto en internacia demonstrado de specimenoj, kaj la rezultato de la enketo estis, ke la grava asocio instruigos Esperanton al ĉiuj siaj geoficistoj kaj anoncigontaj membroj, la kursoj estos honorariataj, kaj dum la Parisa Foiro kapablaj oficistoj klarigos al la eksterlandaj vizitantoj la avantaĝojn de specialaj artikoloj en Esperanto. La 15-an de tiu ĉi monato letere invilitaj profesoroj kaj instruistoj de Esperanto kunvenis en la direkto de supra asocio por fiksi definitivajn planojn por la instruado, kiu komenciĝos la 1 decembro. Mi kredas, ke malmultaj tiaj seriozaj konferencoj okazis ĝis nun. Tial mi priskribos ĝin — mi esperas ke oni tion ne rigardos kiel maldiskreiecon.

Kiam mi alvenis al la centra oficejo, fraŭlino kondukis min al la koncerna kontoro, kie jam ĉeestis la direktoro de la Asocio s-o Grandjean kaj la invilitaj personoj, interalie Prof. Cart. S-o Grandjean estas eltrovinto de stenografista sistemo kaj inventinto de tute nova skribmaŝino (steno-grafia skribmaŝino!), pri kiu mi baldaŭ sendos detalan priskribon. Li lernas Esperanton kaj praktike provis ĝin vojaĝante en Germanujo. La ĝenerala sekretario kaj aliaj membroj de la komitato ĉiuj apogas lin en lia serioza klopodo: aplikado de internacia lingvo en internaciaj aferoj.

Dum la kunsido, kiu daŭris precize unu horon, s-o la direktoro informis nin pri la decidoj rilate al instruado de Esperanto. Li kongis la organizon de la asocio, kiu konsistas el membroj de komercaj kaj industriaj rondoj. Li rimarkigas, ke la asocio ne interesigas provizore pri esp. societoj aŭ pri io ajn ligita al Esperanto. La asocio deziras ĝin — „tute egoiste eksploati“ — la internacian lingvon por praktika celo, kaj se la unua provo alportos la deziratajn sukcesojn, ĝi ne hezitos rekomendi Esperanton al similaj gravaj societoj. Speciala celo de la kursoj estos eduki klarigantojn por la citita ekspozicio. Por tiu celo oni devos anstataŭigi la ĝis nun ĝenerale uzatajn ekcercojn per modernaj tekstoj, kiuj estos preparataj de fakuloj kaj s-o Cart. Ekzemple

anstataŭ lernigi al la partoprenantoj esprimi kiel „kara samideano“ kaj historion pri niaj kongreso, oni uzos frazojn kiel tiuj ĉi: „jen estas moderna skribmaŝino“ aŭ „tiu ĉi motoro estas por altensia elektra fluo“ ktp. Kiel mi skribis, la instruistoj estas bone honorariataj kaj la lernantoj devos pagi sumon kiel en aliaj lingvakursoj, ĉar laŭ la opinio de la komitato „oni atribuas al senpaga afero malgrandan gravecon“.

Same, por tiu ĉi serioza sukceso, ni devas danki la societon „Esperanto kaj komerc“ en Parizo kaj s-on Delanoue, del. de UEA, kiu klopodis por akiri instruistojn.

*Jozefo Major, Paris.*

### Socia vivo.

#### Infanlaboro en Shanghai.

La Komisiono pri Infanlaboro de la urbrataro de Shanghai lastatempe eldonis raporton, kiu forte klarigas la kondiĉojn de infanlaboro en tiu urbo.

La raportoj resumas la rezultatojn de la enketo, pri la kondiĉoj en fabrikoj kaj similaj establaĵoj, en la jenaj vortoj:

„La komenca aĝo diferencas laŭ la naturo de la laboro, sed oni povas diri, ke, ĝenerale, la infano komencas labori en la fabrikoj tuj kiam ĝi havas iun ajn ekonomian valoron por la mastro. La komisiono vidis tre multe da infanoj laborantaj, kiuj ne povas havi pli ol ses jarojn.“

La laborhoroj estas ĝenerale dekdu tage, kun ne pli ol unu libera horo por manĝi. Ofte la infanoj devas stari la tutan tempon ĉe la laboro. En multaj industrioj oni laboras tage kaj nokte, en du vicoj de dekdu horoj.

La kondiĉoj pri atmosfero kaj polvo estas tre ofte malbonaj, kaj la higienaj instalaĵoj en la plimulto el la fabrikoj estas tre nesufiĉaj.

La kontrakta sistemo de laboro estas ĝenerala. Laŭ tiu sistemo la indiĝena kontraktanto havigas la laboristaron kaj estas pagata laŭ produktado. Tiu-sistemo kompreneble favoras la esplotadon. Kelkfoje la infanoj ricevas nenion, kaj iliaj vivkondiĉoj estas efektive tiuj de sklaveco.“

La komisiono rekomendas, ke regularo fariĝu malpermesanta la okupadon de infanoj malpli ol 10-jaraj, kaj ke tiu aĝo estu aligitaj al 12 jaroj en la kurso de kvar jaroj.

(Informservo de la Internacia Labora Oficejo.)

### Literaturo.

#### La Nobel-premion por literaturo

en tiu ĉi jaro ricevis Władysław Reymont, fama pola verkisto, aŭtoro de „Chłopi“ (vilagaĵoj).

*J. R-n, Kraków.*

### Trafiko.

#### La plej miriga kaj la plej malproksima fervojo de la mondo.

Sudameriko povas sin glori pro la posedo de la plej mirinda fervojo, kiu krome estas la plej malproksima. La kapo- kaj la finstacio kuŝas ĉ. 3000 km malproksime de ĉia civilizacio. Nome la veturebleco de riverego Amazonas kaj ĝiaj grandegaj branĉaj riveroj finiĝas en Porto Velho, kiu distancas preskaŭ 3000 km de la maro. Ĉi tie, kie komencas la Madarej—Marmore-Fervojo, vojaĝantoj kaj veturiloj devas esti transportataj 400 km super la riverajn rapidfluojn, por atingi en la okcidento la vetureblajn riverojn de Bolivio. Estis tial peniga entrepreni, eskpedi la eŭropajn komercaĵojn al la nordoriento de Bolivio. Oni bezonis por tio ses monatojn, kaj ĉiu funto da varo estis transportita tra la dorso de la portistoj por eviti la kaskadaron. Por venki ĉi-tiujn malfacilaĵojn, oni komencis en la jaro 1874 la konstruon de fervojo; sed baldaŭ la laboroj devis esti ĉesigataj, ĉar la metodo de ĉiu reŝtupo pro la mortiga klimato kostis homan vivon. Nur kiam la medicina arto helpis al la inĝenieroj, oni povis antaŭ dek jaroj fini la gigantan entreprenon. La fervojlino, kiu evitas deknau rapidfluojn, estas konstruita de la brazila registaro kaj reprezentas la mezan parton de la per la ambaf flankaj akvostroj kompletigita kunigo inter la Pacifiko kaj Atlantiko. Kiel oni diras en Ameriko, la fervojo estas konstruita de „D-o Lovelace kaj finino“, ĉe kio estu klarigante notite, ke Lovelace estas la nomo de l' aventura heroo de romano, populara en la anglosaksaj landoj: „Clarissa Harlowe.“

El „Nueves Wiener Journal“ trad. Heinrich Fahnl, Wien.

### Aviado.

#### Ĉeĥoslovaka aviado atingis kvar mondrekordojn.

Ĉeĥoslovaka aviado, kies daŭro ne estas tro longa, gajnis lasttempe bonajn, eĉ brilajn sukcesojn sur la internacia forumo, el kiuj estas menciindaj plej unue tiu de nunjara Aerosalono kaj plua la akiro de kvar mondrekordoj dum la dua viflugado rapideca pri premio de prezidanto F. G. Masaryk, aranĝita la 7. 9. 1924 de Unuigo de Ĉeĥoslovakaj Aviadistoj. La Fédération aéro-nautique en Paris

ĵus informis Aeroklubon Ĉ. S. R. pri aprobo de sekvantaj rezultatoj kiel la oficialaj rekordoj, kiam oni traesportis ĉiujn alsenditajn dokumentojn:

#### Klaso C (aeroplanoj motoraj).

Rekordoj rapidecaj en unu horo:

1. 100 km kun utila ŝarĝo	250 kg	184,049 km
2. 200 " " " "	250 "	202,988 "
3. 100 " " " "	500 "	202,133 "
4. 200 " " " "	500 "	189,219 "

La flugaparatoj venkintaj estas A 12 kun motoro Maybach 260 ĈF, hejmlandaj fabrikoj. Estas interese, ke Ĉeĥoslovakio ĉi-tie akiris rekordojn, kiujn ĝis nun tenis Ameriko (per aerplano Curtiss kun motoro Libertz 400 ĈF atinginta 180,805 km (en unu horo). Rilate al rimarkinda diferenco de uzita motorforto, ĉaranta entute 140 ĈF, kaj konsidere tion ke la venkintaj aeroplanoj estis ordinaj flugmaŝinoj serialaj de ĉeĥosl. armeo, estas sendube, ke la ĉefa merito je sukceso apartenas ne nur al kapableco de pilotoj, sed eĉ al konstruistoj de aeroplanoj, kiu ĵus en tiu ĉi okazo atestis bone sian staton.

*J. K. Kopecky, Ryechnov n. Kn.*

# Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj komplete informaro, ni bezonas sceligojn (sur postkarto aŭ aparta folieto anuflanke skribite, sed ne inter administraj aŭ privataj sceligoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomi!).

### Aŭstralazio.

Dunedin (Novzelando). F-lino McCarthy gvidas kurson por lerneja infanoj. Loka grupo regule kunvenas.

Palmerston (Novzelando). Kurso de s-o R. Ross kun 30 p.

### Azio.

#### Palestino.

Jerusalem. S-o M. Amiel, antaŭe instruisto de Esp. ĉe Washington Irving High School en New York, gvidas kurson lunde kaj ĵaŭde kun 60 p., inter ili multaj malriĉaj hebreaj laboristoj. Estas dezirinde, por propagandaj celoj sendi esp. gazetojn, librojn, propagandilojn ktp. al s-o M. Amiel, c/o Salomon Amiel, Jerusalem.

### Eŭropo.

#### Anglujo.

Torquay. Ĉe Primitive Methodist School, pro speciala pactago aranĝita de la League of Nations Union la 9. 11., parolado al ĝefanoj de s-o W. R. Wood pri „La Ligo de Nacioj kaj Esperanto.“ W. R. W.

### Aŭstrio.

Steyr. S-o R. v. Lidl havis 5 siaj propagandoj ĉi tie bonan sukceson. Li nun gvidas 3 kursojn por policistoj (45 p.) kaj 3 kursojn por burĝenlertanoj (70 p.); por ambaŭ kursoj la urbo pagas salajron. Krome li gvidas 2 vesperkursojn kun pli ol 60 p. kaj unu kursojn je la duklasa komercernejo. Pluaj kursoj sekvas, verŝajne unu ĉe „Urania“.

Wien. La „Libera Esp. Laborkomunumo“ de la Akademia Esp. Unuigo, Bohema Klubo, Esp. Societo Danubio, Junularo, Progreso kaj Vesperto aranĝis 3 kursojn por komercantoj, gvidataj de s-anoj Kozina, Schickentanz kaj Varkany; 2 kursoj por progresintoj, gvidataj de s-anoj Kozina kaj Ullmann. Kursojn ĉe fervojistoj gvidas ges-anoj Ullmann kaj Metyckr, ĉe urabaj ĝeoficistoj s-ano Ĉeĥ. Paroladojn faris s-anoj pr. Simon, D-o Joki kaj stud. med. Lemperl (el Tallinn).

### Bulgarujo.

Verda Propaganda Semajno okazinta en la tuta lando de 2-9 novembro alportis bonajn fruktojn. Detale ni raportos pri tio en nia venonta numero.

### Francujo.

#### Miaŭdo de la „Verda Kato“ en Paris.

Preskaŭ ĉiusemajne ni legas novan sukceson de la reviviganta movado esperantista en Francujo. Al la multnombraj fortoj, kiuj antaŭenigas nian celon, aliĝas malgranda, intelekta societo: „La Verda Kato“, esperantista Kabareto, kiu per aliaj iloj laboras, kiu kontentigante la amubezonon helpas kompeltigi la laboron de ni ĉiuj. Pri la „Verda Kato“ mem eble aliffoje, ni mi nur volas scigli la grandan sukceson de la sezonkomenco prezentado en rondo de multnombra ĉestantaro.

La 12-an de tiu ĉi monato vespere je 9 h. en intima ejo tuj apud la grandaj bulveroj renkontiĝis la esp. popolo por amuzado. Ne daŭris longtempe, la lokoj ĉiuj okupiĝis kaj la malfrue venintaj devis stari. Vera scenojo prezentis post la fortepiana ludo de s-o E. Barrier la jenan programon: S-o Pfanner (ĝajaj historiotoj), f-lino Sampson (kantoj), s-o Nels (humoraĵoj), s-o Namil Lab (humora kanto), s-ino Jeannette (petolaj kanzonoj), s-o Ehard (mokaj strofoj), s-o Barrier (fortepiano), f-lino Marga Rineca (modaj kanzonoj), s-o Raymond Svare (diversaj ridigaĵoj). Dum la numero la publiko multfoje ridis, poste ridegis kaj daŭrigis la ridadon ĝis fino, ĉar dum la dua parto, dum la prezentado de la revuo: „O... Limpasorto“ ĝi jam ne povis ĉesigi la ridegadon, je ĉe la kunlaboristoj intimitaj, eĉ la verdikanoj nur malfacile povis reteni la ĉiamajn laŭtajn ekridojn malantaŭ la kulisoj. Priskribi la revuon daŭrus tro longe, sciigis, se mi diras, ke Raymond Schwartz verkis ĝin kaj ke la scenoj havas jenajn titolojn: „1. La titolo. — 2. Tute nudaj! — 3. Antaŭen, marŝ! — 4. Sur la bulvardoj. — 5. Revuo de ebrulo. — 6. Ĉe la familio Kukurbo! — 7. Varbu nur! — 8. La pentristoj. — 9. La esperantistoj ne pli legas. — 10. Floro de la Verda Kato. La muzikon aranĝis s-o Barrier, la scenajn dekoracion s-o Löwinger. — Pasis for jam la noktmeza horo, kiam la publiko en bona humoro post longa aplaŭdata disigis; kaj nun — nun atendas la sekvontan prezentadon de la gaja, amuza „Verda Kato.“

*Zoltán Löwinger, Paris.*

### Germanujo.

#### Pli ol 200 gestistoj anoncis sin en Köln por esp. kursoj.

Köln. En publika kurso partoprenas jam 9 oficistoj. Pli ol 200 oficistoj kaj oficistinoj anoncis sin por specialaj kursoj, kiuj komencos en la venonta semajno en ĉambroĝoj de la poŝtoficjo. Du pluaj specialaj kursoj por poŝtistoj (po 15-20 partoprenantoj) estas preparataj. La kursojn gvidas s-o Hurler.

Freiberg, Saksujo. Komencis nova kurso kun 15 p. gvid. K. Spitzner.

Göppersdorf b. Burgstädt. Tri komunum-oficistoj, unu komercisto kaj unu instruisto el Herrenheide lernas Esperanton; instruas s-ano Rauschenbach.

Heidenau. Nova kurso por laboristoj, gvidata de SAT-ano Rolle.

Kemtau im Erzgeb. S-o instruisto Seeling gvidas kurson por komencantoj en lerneja ĉambro, kiu disponigas la lerneja konsilantaro. — Konversacia vespero okazas ĉiumarde en gastejo Prässler.

Krefeld. Partopreno je St. Martin-proceso kun unu grandega kaj 10 grandaj esp. torĉoj, poritiaj de la infanoj de la grupanoj. La torĉproceso marŝis tra la ĉefstrato de la urbo, kaj la propaganda sukceso estis bona. La infanoj ricevis post la fino de proceso sukeraĵajn donacojn de la grupo. 12. 11. propaganda parolado de s-o Karl Giessmann en Volkshaus Nova esp. kurso komencis la 20. 11. kun 22 partoprenantoj, gvid. instruisto Karl Giessmann. La loka gazeto „Niederheinischer Anzeiger“ favoras nian movadon kaj akceptas la alsenditajn artikolojn.

Landshut. La loka grupo elektis post la unua kurso novan estraron: prez. Hubauer, kas. Rohrbacher, sekr. Weiting, kursgvid. Hubauer. — Adreso de la grupo: A. Rohrbachersche Buchhandlung u. Antiquariat, Freyung, en Landshut, Bavario. Kunveno okazas nun en rest. „Bilgerstube“ Ribl, Freyung, marde kaj ĵaŭde je 7.30 h.

Löhmen apud Pirna. En distrikkunveno de la geinstruistoj parolis s-o G. Schubert, lerneestro kaj del. de UEA, pri Esperanto kaj populonejo. Sekve de tio kelkaj geinstruistoj diverslokaj aĉetis lernolibrojn kaj eklermis nian lingvon.

Meißen. Ĉi tie estas fondita neŭtrala Esperanta Klubo, kiu eniris anon de SAT kaj de UEA. Prez. estas s-o Kretschmer, ĉiama estraro de la jam ne ekzistanta grupo de SAT. Membro de la membraro je la fondo pli ol 30. La agado por la movado estas tre vigla. Kunsidoj kaj ekzercentoj ĉiusemajne. Kursoj por komencantoj estas aranĝitaj. En la urbcentro ni fondis Esp. Informaĵon por fremduloj. Por decembrezo ni projektas varbaron kun ekspozicio.

Neumarkt apud Nürnberg. Estas fondita loka grupo de GEA kun 12 membroj. S-o studprofesoro Jos. Maier gvidas kurson por 20 p.

Pirna a. E., Saksujo. Novan kurson por laboristoj kun 20 p. gvidas k-do Friebe. Duono de la partoprenantoj estas sportuloj, vizitantoj la Internacian Laboristaran Olimpiadon en Frankfurt a. M. venontjare.

En la urba komercernejo (supera sekcio) komencis dua kurso kun 21 ĝelernantoj, gvid. studkunsilisto P. Glibckner. La unua kurso estas daŭrigata kun 13 lernantoj.

Potsdam. En la unuigo de instruistoj de Bornim apud Potsdam paroladis instruisto s-o Markau la 12. 11. pri „La helplingvo Esperanto“. Vigla intereso. Kelkaj membroj de la nomita unuigo intencas lerni la lingvon.

### Hispanujo.

Barcelona. Sidejo de la grupo „Paco kaj Amo“ nun estas Strato Ros de Olano n-o 6 (Interior).

### Hungarujo.

Miskolc. Baldaŭ finiĝos la ĉiudimanĉa kurso, kiu la loka tagjurnalo „Reggeli Hirtlap“ laŭ propra iniciato aperigas depost fino de junio en la redaktado de Prof. König. La kurso grave interesis la publikon pri Esp., kion pravas la ĵus aranĝita konkurso de la jurnalo. Alia signo de la intereso estas, ke la gvidantaro de la porvirina popola ĉestlernejo metis Esp. en la programon de la instruado laŭ deziro de la interesiĝoj kaj invitis Prof. König por gvidi la kursojn. Anoncis sin 152 partoprenantoj! Ankoraŭ neniam oni konstatis tiel grandan intereseon en Hungarujo.

### Italujo.

Milano. La 15. 11. okazis la jara kunveno de la Esp. Domo por la elekto de la nova konsilantaro. Estas elektitaj: D-o A. Filippetti, prez.; inĝ. M. Pioniskri, viceprez.; Rag. G. Tanzi, sekr.-kas.; s-o P. Giollati, s-oi Cattorini, Ciribini, Ghezzi, Girola, Nobile, Piatti, Zanaboni, konsilantoj. S-oj Busso, La Pila, Sacchi, revizoroj.

### Jugoslavio.

Subotica. La ĉi tiea esperantistoj kunvenadas en „Urba Kafelo“, kies posedanto abonis ET. Post du semajnoj finiĝos esp. kurso, gvid. s-o Béla Spitzer, del. de UEA. Rezultato sufiĉe bona. Blinduloj multnombro interesiĝas al nia lingvo. Kvar el ili jam aliĝis al kurso, komencota dum januaro 1925.

Senta. La nova esperantistoj invitis la kursgvidanton el Subotica por klarigi al ili kelkajn lecionojn. Komencis lerni 60 ĝejunuloj, plimultnombro lernantoj.

### Norvegujo.

Bekkelagshogda. Kurso kun 20 ĝejunuloj ĉe komunist-junulara societo „Brand“.

Drammen. Fondiĝis grupo kun 11 p.

Kristiania. La 50.—51. 8. okazis la unua jarkunveno de Norveglingva Asocio de Lab. Esperantistoj, kiu nun havas 72 membrojn; ĉestis 22 reprezentantoj el diversaj partoj de la lando kaj diversaj gastejoj, i. a. s-ano Elvar Adamson, prez. de la sveda fratorganizajo.

Lorenskog. Studcircolo kun 15 p.

### Polujo.

Chodorów. Ĉe ĉi tiea fervojsista sindikato komencigis kurso por komencantoj kun 18 p., kiu gvidas k-do Rudolf Dvorak, sekr. de Lab. Esp. Soc. en Lów. —

Kraków. La 6. 11. okazis en ĉi tiea societo „Esperanto“ kunveno de gesamandanoj kaj gastejo. S-o Prof. D-o O. Bujwid feris interesan prelegon pri la Wiena Kongreso kaj s-o D-o M. Blasberg parolis pri siaj impresoj dum esp. kongresoj inter malsamnacianoj. — Oni malfiermis novan kurson. — Delegacio de eminentaj krakovaj esperantistoj partoprenis dum la alveno de l' korpo de Henryk Sienkiewicz, aŭtoro de „Quo Vadis?“ el Svisujo sur poita tero kaj dum la solena entingo en Warszawa.

*J. Rubinstein, Kraków.*

Kraków. (El tiu ĉi urbo ni ricevis sekvantan raporton, kies unuan alineon polaj legantoj eble komprenos pli bone ol ni. — Red.)

Ni legas, ke fondiĝis en K. radioklubo (pole = radio-klub). Ĝia prez. elektita estas Prof. Banachiewicz, estro de Krakova Astronomia Observacio, konata ano de Laŭno sen flexione de Peano. Nu, inter la komitatanoj de la ĵus fondita klubo troviĝas ankaŭ Prof. Kosteki, direktoro de Krakova alta industrilernejo; ĵama prez. de Krakova „Societo Esperanto“, nun ankoraŭ prez. de Krakova „Pola Esp. Societo“. Ni dezirus scii, ĉu Prof. Kosteki entreprenos ion por kontraŭbatali certe aperontajn „radiopeanaĵojn“ de

la prez. Banachiewicz. Ĉar notu bone: la t.n. Pola Esp. Societo ekzistas neniam alie ol sur la satinita papero de la Jarlibro de UEA, el kiu ĝi ĝor por la bono de la netroigata esp. statistiko devus absolute malaperi.

La sama motivo, kiel la laste menciita, igas nin scigi, ke bedaŭrinde ne plu aperas en „Kurjer Wicczorny” kurso de Esp., antaŭ kelkaj semajnoj komenciata de Leo Turno, ĉar tiu ĉi ĵurnalo ĉesis aperigi. Eble kelka kompenso estas la fakto, ke multe aĉetis en Malgrandpola kiel Silezio la esp. lernolibro de la redaktinto de la abortita kurso. Krome nin ĝojigas baldaŭa apero de Esp.-pola Vortareto kunhavanta la 16 fundamentajn Esp.-regulojn, kunlaboraĵo de la trio Kuhl-Turno-Grenkamp; ĝi estas eldonata de „Esperantista Voco”, Jaslo.

Kurso de Esperanto estas aranĝota kiel ĉiujare ĉe „Societo Esperanto” (Sławkowska 6). Por vigligi la movadon de la societo paroladis la 6. 11. Prof. Buiwid pri la XVI-a en Vien. Poste rakontis interesajn anekdotojn el la kongreso D-o Blassberg.

Ostrów Mazowiecki. Meze de junio komenciata kurso de Antoni Jaworski kun 6 p. (precipe lernantinoj de gimnazio) nun finiĝis. Novaj kursoj por printempo kaj somero projektataj. Kunveno ĉiudimane.

**Ruslando.**

Kiev (Ukrainio). 4. 11. parolado de s-o Paniŝevski dum la gubernia konferenco de vilaĝanoj. — 12. 11. s-o Hait raportis en klubo de invalidoj. Estas akceptita efika rezolucio por Esp. — 16. 11. en klubo de regnaj kursoj de Esp. s-o Paniŝevski legis referaton pri „Bona silo”. — En la ĵus fermita turbarba ekspozicio de murgazetoj, esp. murgazeto de la kursoj estas aprobita kiel modelo por ĉiuj murgazetoj.

**Esperanto en Lernejo.**

**Aŭstrio.**

En Steyr 3 kursoj de s-o v. Lidl por 70 burĝlernejanoj kaj unu kurso ĉe duaklasa komerca lernejo.

**Germanujo.**

M.-Gladbach. S-o instr. Wilkes, interesinte sin kaj kelkajn gekoleginojn pri Esp., sukcesis aranĝi kurson, kiun gvidos s-o instr. Brendgens el Rheydt.

**Nederlando.**

Utrecht. Komenciĝis kurso de 25 katolikaj geinstruistoj, gvidata de s-ino Isbrücker el Hago.

Haag. Post propaganda parolado de s-ino Isbrücker en la gepatra kunveno de publika lernejo, oni esprimis unuvoĉe la deziron, ekkonduki Esperanton en la publikajn lernejojn kaj komisiis la gepatran komisionon transdoni tiun proponon al la Centra Komisiono.

**Radio.**

**El Köbenhavn.**

Internacia Radio-Asocio en Danujo disaŭdigas konstante ĉiumerkrede je 9.20—9.50 h. vespere MET el Lyngby Radio sur ondo 2400.

S-o Paul Lendorff, sekr. de IRA, parolas kvin minutojn danlingve pri eksterlandaj radionovajoj pere de Esperanto; poste ni donos diversajn praktikajn informojn al la radio-amatoroj kaj eble koncero.

Adreso: Paul Lendorff, Dybbølsgade 35, Köbenhavn B.

**Radioparoladon en Esperanto**

faros Dir. Glück el stacio Königswusterhausen dimanĉon, 30 nov., tagmeze je 12 h. MET sur ondo 2800, pri Radio-Ekspozicio kaj Radio-Fairo en Berlin. Aŭskultantoj sciigu mallonge s-on Dir. J. Glück, Berlin W. 35, Potsdamerstr. 113, Haus V.

**Radio-disaŭdigo el Königswusterhausen.**

La unua disaŭdigo, kiun Esperanto-Gruparo Berlin povis aranĝi la 16 novembro en la ĉefradiostacio Königswusterhausen apud Berlin, estis plena sukceso, malgraŭ ne antaŭvidita malhelpaĵeto. Ĉi tiu estis ŝanĝo de la ondolongo por la unua parto de la programo, en kiu telegrafdirektoro Behrendt faris sian germanlingvan paroladon pri la graveco de Esperanto por radio. La unua parto de la programo estis sendita sur la kutima ondo 680, kiun ni ankaŭ anoncis en n-o 218 de ET, sed alveninte en la sendstacio, la esperantistaj „artistoj” devis ekscii, ke pro gravaj teknikaj kaŭzoj, kiujn ni ĉi tie ne povas klarigi, oni forlasis la kutiman ondon, destinitan precipe por germanaj aŭskultantoj, kaj transiris al ondo 2450. Tiel okazis, ke la plej multaj aŭskultantoj germanaj, kiuj ne posedas ricevaraparaton por ondoj pli longaj ol 800 m, ne povis aŭdi la vere bonegan — laŭ enhavo kaj parolmaniero — paroladon de s-o Behrendt.

La dua, muzika parto de la esp. programo funkciis sen interna malhelpo. F-lino Nickel brile kantis tri strofojn de „Tagiĝo”, D-o Liebeck per sia belsonora baso prezentis la „Kanton de Weyla” kaj aldonis la germanan popolkanton „La mastrina flino” (Kunuloj tri migris trans Rejnriver), kaj f-lino Nickel kaj s-o Ellersiek duete aŭdigs la germanan popolkanton „Knab’ rozeton vidis li”. Poste s-o Behrendt faris esp. alparoladon al la aŭskultantaj samsamlingvanoj, petante ilin, scigi la oficejon de Esperanto-Gruparo Berlin pri la aŭskultitaĵoj.

Mi ricevis jam kelkajn informojn el diversaj landoj, kaj ĉiuj konstatas bonegan aŭdeblecon kaj mirigan klarecon de la esp. senditaĵoj. Precipe grava estis la detala sciigo de prof. ing. Scholze el Reichenberg (Bohemujo), kiu ne nur laŭdas, sed ankaŭ serioze kritikas la prezentitaĵojn. La „artistoj” estas treege dankemaj al li pro tio, ĉar liaj kritikoj estas valoraj por venontaj prezentadoj. Al ĉiuj informintoj ni ankaŭ ĉi tie dankas pro ilia helpo; la ricevitaĵaj respondoj ni konigos al la direkto de la ĉefradiostacio Königswusterhausen.

Ne malpli grava sukceso, kiun ni atingis en Königswusterhausen, estas la fondo de Germana Radio-Esperanta Ligo tuj post la finita programo. La estraro de la ligo konsistas el jenaj personoj: telegrafdirektoro Behrendt, prezidanto; telegrafdirektoro Gerlach, direktoro de la stacio Königswusterhausen, vicprezidanto; D-o Liebeck, 1-a sekretario; urba jurkonsilisto Feder el Chemnitz (kiu hazarde ĉeestis la prezentadon kiel gastoj), 2-a sekretario; s-o Ellersiek, kasisto. Ĉiuj radioesperantistoj el Germanujo estas petataj, aliĝi al la ligo. Gisplue ĝi ne postulos devigan kotizon, sed akceptos nur libervolajn mondonacojn. La ligo celas la enkondukon de Esperanto por radio en germanlingvaj landoj. Aliĝ-anoncojn oni sendu al s-o F. Ellersiek, Berlin SW 61, Wilmstr. 5. F. E.

**Esperanto-kurso en Vox-Haus, Berlin.**

Sabaton, la 22 nov., komenciĝis esp. kurso en Vox-Haus, la loka sendstacio de Berlin. Ĝi okazas ĉiusemajne, sabato posttagmeze, inter 4.00 kaj 4.30 h., sur ondo 430. Parolanto estas direktoro Glück, la prezidanto de Esperanto-Gruparo Berlin. Ĉi tiun novan sukceson la Gruparo ŝuldas al la klopodoj de s-oj Glück kaj D-o Kliemke. F. F.

**Invito**

al Aŭstruja Esperanto-Delegitaro-Konferenco en Graz la 7. kaj 8. 12. 1924.

Laŭ la deziro de la A. E.-D. kunveno dum la XVI-a en Vien kaj konforme al la unua invito en „Aŭstria Esperantisto”, ni, dankante al la samideanoj en Graz, kunvenu en la ĉefurbo de Stirio, por interkonsili pri la plua laboro en Aŭstrio, interrompita per la mondkongresaj aferoj. Ĝis nun el 4 landoj: Salzburg, Stirio, Tirolo kaj Vien, delegitoj jam estas anoncintaj.

La tagordo estos: 1. Direktantar-raporto; 2. Landesfraraj raportoj; 3. Specialaj raportoj; 4. Direktantara noveleto; 5. Pritrakto de laborprogramo, propono publikigita jam en „A. E.”; 6. Pripenseza decido; 7. Proponoj.

Ĉiu delegito devas esti lingvokapabla esperantisto

Societoj ne jam aliĝintaj tuj aliĝu kaj nomu delegitojn.

Pri kunvenejo informo estos dissendata aŭ scigata en Graz, Schönauergasse 6. — La ĉefkunveno okazos dimanĉe, la 7. 12., antaŭtagmeze kaj posttagmeze.

Venu multnombrel!

Por la direktantaro de A. E. D.: F. J. Schade.

**Esperantista Rondo „Konkordo.” Varsovio, Dzika 9, e. 10.**

**Novembra komuniko.**

El multaj flankoj estas ofte aŭdataj mokoĵ kaj maŝatvortoj: viaj idealismoj plene bankrotis, la popoloj fariĝis nacionalismaj, la homoj — ŝovinismaj; ridindaj vi estas kun viaj utopioj pri „repaciĝo kaj konkordo”.

Ĉio-ĉi estas ankaŭ unu el la multnombraj nekalkuleblaj malutilaj efikoj de l’ mondmilito. — Dum preskaŭ dek jaroj la homoj sin mortigadis reciproke. Sur la batalkampoj la unuaj, plej konkretaj efikoj de milito evidentigis plej frue. Sed malantaŭ la fronto la efikoj de l’ milito faris ne malpli da malutilo ol sur la batalkampoj. Se sur la kampoj faladis homaj korpoj, do sur la restinta jero faladis kun ankoraŭ plia rapideco la homaj animoj. Oni do devas peni rekonstrui ne nur la materialajn perdojn kaŭzitajn de la milito, sed ankaŭ la moralajn.

Unu el tiaj movadoj, havantaj kiel taskon resanigi la moralan staton de l’ homaro, estas „Konkordo”. — Nin mokoĵ kaj maŝatvoj ne fortimigos. Se eĉ oni nin nomas utopiojn, ni respondu per la vortoj de Ch. Richet: De utopio ĝis realeco estas nur la demando de l’ tempo, kaj tiu mallongigi — dependas ja de ni, homoj.

Tro ofte ni aŭdas en la interparolo de l’ samideanaro pri la „interna ideo”. Kial do ne kunigi ĉiujn adeptoj de tiu nobla celo? Kial do restas la „interna ideo”-anoj tiel malaktivaj?

Kie vi estas, multmiloj da idealistoj, kial oferiĝ grandan parton de sia vivo por la ideala kaŭzo? Vekiĝu! Kunigi!

Varsovio.

La Komitato.

**La venonta numero**

de ET eliros merkredon, 3 dec., kaj de tiam nia ĵurnalo aperados jam regule

**dufoje en la semajno.**

Enmemorigu ankaŭ la novan filolon post novjaro:

**Heroldo de Esperanto.**

**Tabakkontraŭuloj.**

Esp. gazetaro tutmonda ricevis novan kolegon, kvankam ankoraŭ modeste vestitan: Verda Kruco, verkfolio de Esperantista Tabakkontraŭula Asocio. Tiu ĉi asocio estas fondita dum la Universala Esp. Kongreso en Vien. Rilate al la granda signifo, kiun meritas la internacia batalo kontraŭtabaka, estas tre grave, ke ankaŭ en Esperanto nun aperas publikigo de ĉi tiu nobla movado. Adreso: Esp. Tabakkontraŭula Asocio, Wien 69, Postfach, Aŭstrio.

D-o Hlouchka.

**Bibliografio.**

**Libroj.**

Skotlanda Pejzaĝo. (Scottish Scenery.) Ilustr. gvidlibro tra skotaj vidindaĵoj. Kun aldono de kanto „Belega Skotlando”. Eldonejo Higgle & K-to, Rothsay, Glasgow Skotlando. Prezo 1 ŝil.

Pli ol trideko da ilustraĵoj laŭ fotografaĵoj, presitaj sur luksa papero kaj klarigitaj dulingve (angle kaj esperante). — La sama firmo eldonis: „Belega Skotlando” (historio, naciaj karakteroj ktp.). 32 paĝetoj kaj kovrililo. Prezo 1 penco. — „Boni Skotland, printed in Foneitk Longhand”. Tre interesa. Pri fonetika skribo de angla lingvo, kun rilatoj al Esp. Prezo 2 pencoj — „Peace and Goodwill”. Broŝuro en lingvoj angla kaj esp. — „Sweet Rothsay Bay”, „Auld Langsain”. Dulingvaj kartoj (angle, esp.). — „Malaŭva Temp.” Esp. traduko de „Auld Lang Syne”. Sur kartoj.

Gvidlibreto por japanaj esperantistoj pri Japana Asocio por la Ligo de Nacioj. 1924. 13:19 cm, 8 p. Placa aranĝo. Bedaŭrinde ne legebla por eŭropanoj.

Penspotenco (Thought power). La kuracado de malsano, malriĉo kaj mevio. Sukceso kaj felico. Ciama ĵuneco. De Anna W. Mills, tradukita de William Bailey. Sumfield Press, Station St. Eastbourne, Anglujo 12:16 cm, 46 p. Prezo 9 pencoj. Ĉi tiu leginda libreto sciigas pri kuracado de malsano ktp. per la potenco de la propraj pensoj laŭ aŭtosugesta metodo. H. D.

**Gazetoj.**

Sennaciulo, Leipzig, 20. 11. La Progreso, Praha, okt. Atendinda art. „Propagandu per faktoj”.

France Esperanto, Paris, nov. Arbeiter-Esperantisten, Kristiania, nov. La Suda Kruco, Melbourne, okt. La Suno Hispana, Valencia, okt. Hungara Esperantisto, Budapest, nov. Literatura Mondo, Budapest, sept. okt. Nova adreso: Hung. Esp. Instituto, Budapest VI, Eötvös-utca 5. Amerika Esperantisto, Boston, aŭg. sept.

**Gazetaro.**

Der deutsche Rundfunk, Berlin, 16. 11. Kun rubriko „Esperanto”. Badener Tagblatt, Baden (Svis.), 25. 10. art. pri ldo, 51. 10. respondo de esp. s-o A. Egg. Diario de Lisboa, 12. 11. Granda art. pri oficiala rekonno de Esp. per L. d. N. Bergwacht, Waldenburg, Germ., Silezio, 4. 11. Anonco kaj art. pri Esp. Revista del Ateneo, Jerez de la Frontera, 15. 11. Du paĝoj da artikoloj en Esp. kun hisp. traduko.

**Nekrologo.**

Antaŭ nelonge en vilaĝeto Maksyviĉai en Litovujo, kie li volis sin savi de fizio, mortis nia fervora samideano

**B. Duda.**

Li multe laboradis por la disvastigo de nia movado. Eĉ kuŝante sur la mortolito, ni ne ĉesis interesiĝi pri tio, al kio li dediĉis sian tutan vivon. Sur lia ankoraŭ senherba tombo ni ĵuras daŭrigi lian homarutilan agadon, per kio ni kontentigos lin, forfalĉitan en ĵunaĝo, pli ol per starigo de ŝtona monumento sur lian tombon. Ripozu, kara samideano, en la vilaĝo kvieteco, pri kiu vi revis dum via mallonga vivo en urbo, kiun vi ne ŝatis!

Samtempe mortis s-anino

**Butnevich**

ankaŭ multe laborinta por Esperanto. Ankaŭ ŝin, tre ĵunan, forrabis de ni la kruela fizio. Ankaŭ ŝi ripozu en paco!

J. N. J.

**Libera tribuneno.**

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas loiale enpresataj ĉiaj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netrajn artikolojn.

**274. Respondo al 267.**

Miaopinie „esperanteno” estas pli regula kaj pli logika ol „esperantisto”. Se adeptoj de Kristo estas „kristano”, adeptoj de Esperanto devas esti „esperantanoj”. Alia afero, se oni celas nomon uzantan esperanton profesie (esp. tradukisto, esp. instruisto k. a. pagataj). Tiam logike kaj regule postulas esprimon „esperantisto”. Estas tre dezirata opinio pri tio de L. K.

N. Medousov, Tambov, Rusujo.

**275. Kial U. K. ĉiam en Eŭropo?**

Mi deziras fari longatempe pripensitan proponon. De antaŭ longe oni kunvenigis kongresojn nur en Eŭropo, kie kompreneble la samideanoj estas plej multenombraj. Tio faras ja grandiozan impreson, sed mi dubas, ĉu ĝi helpas disvastiĝi la lingvon ekster eŭropaj landoj.

Tiel mi sugestas, ke oni okazigu ĉiun alternan kongreson ekster Eŭropo aŭ almenaŭ ekster Centra Eŭropo, por ke malproksimaj samideanoj diverslokaj povu foje esperi ĉeesti kongreson. La kongresoj en Centra Eŭropo estas pro tia ŝanĝo eĉ pli imponaj kaj multe ĉeestataj. La alternaj kongresoj disvastigos Esperanton en novajn rondojn, kvankam nur kelkaj centoj ĉeestos. Ekzemple, ni kongresu en Kairo, Egiptujo; en Manila P. I.; aŭ Singapur, aŭ Seul, aŭ Rio de Janeiro.

Norman W. Frost, Cambridge 38, Mass., Usono.

**Alvokoj.**

**Komercestoj ĉiulandaj!**

Klopodante pri ekkonduko de Esperanto en nia komerclernejo en Pirna, mi spertis la gravan valoron de esp. statistiko sur nia komerclernejo

kampo per ĝia absoluta malesto. Eĉ la Germ. Esp. Instituto nur povis esprimi al mi sian bedaŭron, ke tia statistiko ne jam ekzistas.

Tial mi petegas vin, est. gekolegaj komercinstruistaj, kiuj vi komprenas la necesegon de statistiko, donu al mi koncizajn informojn pri la esp. instru en viaj lernejoj laŭ jena plano: Lando; urbo; grado de la kom.-lernejo; esp. instruo depost kiu jaro; oficiala, deviga, nedeviga, privata; nombro de nunaj esp. klasoj aŭ kursoj; nombro de nunaj esp. lernantoj; nomo de la instruisto.

Ne timu, est. gekolegaj, ke mi intencas fondi novan asocion. Mi nur kolektos la materialojn kaj resume publikigos ĝin poste por ĉies profito en ET.

Akceptu antaŭe mian dankon kaj kolegan saluton.

Paul Glöckner, komercinstruisto, del. UEA, Pirna a. E., Germ., Gartenstr. 52.

Al la kuracistoj ĉiulandaj.

La Centra Komitato de TEKA, elektita por unu jaro okaze de la XVI-a en Wien, pro revivigo de la Asocio, komencis tuj post la kongreso sian agadon. Sed la rezultato ĝis nun ne estas tre granda. Mondnacojn sendis: D-oj Robin 5 dol., Blassberg 80 zlot., Jurkovsky 5 zlot., Gelibter 10 zlot., Bloch 20 kĉ., Heller 20 kĉ., Bischiŝki 25 kĉ., Ulman 50 kĉ., Sós 100 000 aŭstr. kr.

Estimataj kolegoj, imitu la bonajn ekzemplojn. Mensendoj estas adresataj al: D-o Edmund Sós, Wien I, Tuchlauben 18 (Aŭstrio). (Naciaj esp. gazetoj bonvolu repressi!)

Esp. ekspozicio en Meissen

estas aranĝata meze de decembro. Por ke ĝi bone sukcesu, ni petas ĉiujn samideanojn sendi al ni gazetojn, propagandilojn ktp. (prunte aŭ donace). Bonvolu vin turni al la sekretario s-o Heriel, Meissen, Germ., Vorbrückerstr. 7.

Leterkesto.

A. J. en O. Raporto kaj poemo aperos. Pri traduko neeble respondi, ĉar vi forgesis indiki registro-numeron. Foto ne povos aperi, ĉar kiliso tro multekosta.

K. O. en E. Paga abonon al ni por aboni ĝis jarkon. Komence de januaro vi abonos preferinde ĉe via postoficejo; tiam vi ricevos nian ĵurnalon duonsemajne kaj pagos ne pli, ol alie vi devus pagi por semajna ekspedado.

F. en H. Ankaŭ en via lando poŝtbono estas ebla kaj preferinda. Abonu jam unu semajnon antaŭ komenco de nova kvaronjaro!

S. en M. Manuskripto skribu nur unuflanke kaj tre legeble!

Esp. Grupo en S. Alvoko pri elsendo de esp. materialo estas anoncota kaj devas estis pagata.

Tra la mondo.

Maneskribata internacia rondiranta ĵurnalo. La ĵurnalo estas piej efika rimedo por subteni konstantan intereson al la lingvo en komencantoj, gekursanoj, ĝejnuloj, infanoj. Ankaŭ ĝi estas rekomendata al ĉiu samideano, kiu deziras perfektigi en Esperanto, ankaŭ al skribemuloj, verkistoj, tradukistoj, kiuj ne havas eblon ial vidi siajn artikolojn presitaj. — En ĉiu kajero partoprenas dek samideanoj de malsamaj landoj. — En ĉiu kajero estas problemoj, konkursoj kaj aliaj interesindaĵoj kun multaj valoraj premioj. — Jam en multaj landoj la ĵurnalo havas grandan sukceson! — Partoprenantoj de la ĵurnalo enskribas en kajerojn ricevitajn siajn artikolojn originalajn aŭ tradukitajn, aŭ versajojn laŭ sia plaĉo kaj elekto, faras notojn kaj korektojn en artikoloj jam enskribitaj kaj cet. — Abonjaro komenciĝas de kiam ajn dato. — Jara kotizaĵo estas 1 amerika dolaro. — Gekursanoj, anoj de esp. grupoj, familianoj kaj cet., aliĝante ope — pagas 1 amer. dolaron + 0.20 de dolaro por ĉiu plua partoprenanto. — La kotizaĵo oni sendu en leteroj rekomenditaj (en amer. dolaroj aŭ en bankbiletoj de sia lando laŭ taga kurzo de amer. dolaro) al la administranto de la ĵurnalo: S-o F. Krämer, Lehrer, Annaberg, Erzg., Germanujo. — Pluaj detaloj estas riceveblaj de la administranto kontraŭ unu responduklupo. — Detala regularo por partoprenantoj estas en ĉiu kajero de la ĵurnalo.

Festgazeto de l' V-a Laborista Esperanto-Kongreso Germanlingvulo. Formato: 24x30 cm. 50 paĝoj. Dulingva, kun kolora kovrilo. Prezo 1,20 mk. Enhavas valorajn artikolojn de D-o Dietterle, Studonsillsto Kirsien, Marcel Bouabou, Barbusse k. a. krom multaj propagand-artikoloj pri Esperanto rilata al laboristaro, ĝinastik- kaj sport-movado, ŝakludo, ĵurnalaro, naturamiko ktp. — Ĉi tiu festskribaĵo aperis nur unufoje kaj ial ĝi estas historia dokumento pri la laborista Esperanto-movado en Germanujo kun konstanta valoro. Ĉiu esperantisto devus posedi ĝin! Havebla antaŭpage ĉe: Laborista Esperanto-Asocio por Germanlingvulo, distrikto „Erzgebirge-Vogtland“. Administrato: G. Münch, Chemnitz, Mathildenstr. 42 2.

Kio estas S.A.T.

S.A.T. estas organizaĵo celanta meĉi Esp. je la servo de la proletaro tutmonda. S.A.T. estas perespartita aparato neniel politika kvankam utilca. laboristoserĝa, estas samtempe alidare: ĝi celas krei ĉe siaj membroj sennaciecan spiritostaton. Klajn organojn havas S.A.T. por plenumi tian taskon? S.A.T. eldonas por plenumi tian taskon semajnan revuon, „Sennaculo“ (Redakcio: 24 Boulevard Beaumarchais, Paris XI; Administracio Colmarstr. 1, III, Leipzig-Städt., Germanujo) S.A.T. eldonas per sia Eldonkooperativo gravajn verkojn el la ĵurnalo „Falsio“ de Goethe kaj „Eklumo en Abismon“ de H. Barbousse estas jam aperintaj eldonas ĵurnalojn, entenantajn la adresojn de sia membraro, statisikojn pri la laborista movado en la mondo kaj piej diversajn sciindaĵojn. Kion jam faris S.A.T.? S.A.T. okazigis 5 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson de Esp. en proletaj randoj. S.A.T. estas lege enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennacieca Asocio Tutmonda, 25 rue Boyer, Paris XX.

Novaj tempoj. Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandas novan pedagogion, per-laboran lernejon kaj per-edukan pacon. Petu specimen de: M. Goldberg, Leipzig-Co. Klemmstr. 14. Klemmstr. 14.

Anoncetoj.

Anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 30 vortoj egalvaloron de 1.80 sv. fr. — Anonceto pri korespondanta egalvaloron kostas po du enpresoj kaj po 15 vortoj (krom unu adreso) egalvaloron de 1.20 sv. fr. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĝo, edziĝo, morto, okazintaĵoj gravaj esp. kunvenoj, paroladoj, festoj k. s.) estas senpagaj (unufolia enpresoj). — Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ aperdato.

NASKIĜO. Al s-o Gustav Fischer, Kaiserstr. 59, Gladbeck i. W., (Germ.), naskiĝis filineo Hannicore. [1] EDZIĜO. S-ano Smiga Roman el Stonawa, Ĉeĥoslovakio, edziĝis kun fraŭlino Szczerbowa Amalja la 22. 11. 1924. [1] GRAFOLOGIO. Klaraj juĝoj de la karaktero estas projektataj esperantlingve de P. Beier, Ottendorf ĉe Greiffenberg (Schl.), Germanujo. Prezo 1 mk. aŭ egalvalor. [1]

MIA KRISTNASKA KAJ NOVJARA DONACO! Mi deziras montri al la urbestro kaj la lerneja komisiono, ke oni per anonco povas havigi multnombrojn belajn il. PK aŭ kartojn kiuj koncernas Esp. Mi ankaŭ atendas, ke eĉ brazilaj, japanaj, grekaj kaj diversnaciaj amikoj sendos propagandmaterialon al samideano en la alta nordo. Mi respondos tuj per samvaloraj aĵoj. Mial maniero memori nian maistron estas senleca laboro. S-ino Magda Mammen, del. UEA, Grenaa, Danlando. Gvidlibrojn, gazetojn kaj fotografarojn mi volonte akceptos. [2]

ESP. EKSPOZICIO. Por akceli la sukceson de nia movado ni aranĝas Esperanto-ekspozicion kaj petas ĉiujn eldondojn, redakciojn, societojn kaj opajn esperantistojn helplini pri elsendo de ĉiujpecaj esperantiloj. Elkoran antaŭdankon! Adreso: Esperantista Kluo Domažlice-Cechy, Ĉeĥoslovakio. [2]

ESP. EKSPOZICIO. La Esp. Domo en Milano, Italujo, Via Spiga 29, dezirante malfermi esp. ekspozicion, antaŭdankante petas al la samideanaro ĉiujpecajn esperantilojn. [2]

Frankan Poŝtmarkon de BRUSELA EKSPOZICIO 1924 mi interŝanĝas kontraŭ kolekto de ĉiuj germanaj PK novelonitaj en 1924. Skribu al E. Hendrickx, Marktgravellei 199, Antwerpen (Belg.). [2]

PETO Gesamideanoj ĉiulandaj! Redaktoroj! Helpu al nia propagando! Sendu almenaŭ po unu PK ilustritan kaj gazeton servojn en la aranĝota ekspozicio de nia grupo dum maro por pruvu, ke Esperanto estas disvastigita. Koregajn antaŭdankojn! Adreso: Esperantista grupo „Sukceso“, urbo Vraca, Bulgarujo. [2]

SIAN ESP. BIBLIOTEKON (tre maloftaj libroj kaj gazetoj grandpartiaj bnditaj) vendas kaj nomaron nur al serioza, aĉetemuloj sendas: Iv. Krestanoff, en Pirdop, apud Sofia, Bulgarujo. [3]

AL DISIRINTA L. K. K. EN WIEN. En Wien mi ne ricevis monsumon de 25 mk. destinitan por mi. La poŝto konstatas la alvenon de la mono en Wien. Letero, kiun mi skribis al Wien, revenis. L. K. K. ne plu ekzistas. Al kiu mi turnu min, por ricevi mian monon? Albert Weber, Altwasser 2, Hochwaldstr. 6, Silezio, Germanujo. [1]

DANA OFICISTO deziras postenojn kiel helpanto en iu banka, komerca aŭ teknika branĉo; scias la skandinavian, germanan, anglan kaj internacian lingvon. Deziras iri al Francujo, Belgio, Holando, Ĉeĥoslovakio aŭ Volonio al Svedujo. Ne postulas alian salaron. Ĉu estas veraj esperantistoj, kiuj legas la anoncon? Donu apogon al vera maldesta samideano. Volonte li instruos Esperanton al la familianoj. Skribu tuj al Esperanto grupo, delegitino de UEA, Grenaa, Danlando. [3]

Korespondantoj kaj Interŝanĝo.

S-o Horváth Francisko deziras korespondadi kun ĉiulandanoj, PK, PM. Adreso: Szombathely, Alsó hegy, Hungario. [2]

Pirna a. E., Germanujo, Gartenstr. 52, s-o Paul Glöckner, komercinstruisto, serĉas korespondantojn por si kaj siaj 34 gelnantojn. [2]

S-o Oskar Schädlich, Neu-Gasse 1, Zwickau-Schedewitz i. Sa., Germanujo, deziras interŝanĝi PK il., L, gazetojn ktp. kun tuta mondo. Respondos nepre. [2]

Richard Gerhard Börner, Dresden-A., Poststr. 21, prezentigas per la akĉeton de ĉiuj germanaj komercaĵoj. [2]

J. B. E. de Koster ŝanĝas PK il. kaj PM. Daltonstraat 95, Den Haag, Holando. [2]

F-lino, poŝtoficistino, 21 jara, deziras interŝanĝi per il. PK kaj L kun gesamideanoj. Bonvolu skribi, nepre respondu! Latvio, Rujēne, Pasta Kantori, Ĵaunpils. [2]

Bulgarujo, Pleven — kv. 8, ul. 4, n-o 51, N. D. Iskŝkov — deziras korespondadi kun tuta mondo, ĉiam respondas, interŝanĝas papermonojn, naciajn esp. gazetojn, il. PK, PM ktp. [2]

S-o Zeley Ferenc, Szolnok, Városháza (Hungarujo), deziras interŝanĝi PM, respondos nepre. [2]

S-o H. Sobel, lernejestro, Ned. Mettray, Eelde, Nederlando, deziras korespondadi pri edukado kaj framasonismo per il. PK bil. kaj precipi L. [2]

S-o Joseph Maier, studprofesoro en Neumarkt Opf., Bavarujo, Germanujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi kun eksterlandanoj. Mi promesas ĉiaman kaj certan respondon. [2]

S-o Kaizo Fukuta, Yakusen, Tojama, Japanujo, deziras interŝanĝi PK il., PM tra la mondo. Preferas kun Ameriko, Afriko, Turkujo, Kubo, Okekujo. [2]

Fraŭlo Viktor Van Beylen, arpentistaro, Grote Markt 50, Antwerpen (Belgujo), deziras korespondi per PK kaj L, pri ĉiuj interesaj temoj kun gesam-oj el ĉiuj landoj. [2]

S-o R. Schönwälder, Hermannseifen, Bohemio, deziras korespondi kun gesamideanoj en malpli proksimaj landoj. Mi celas ĝoigi miajn gekursanojn per scilgoj pri landaj aferoj. Ankaŭ biletkartoj, poŝtkartoj k. a. dezirataj. Al ĉiu ni respondas. [2]

Al la tutmonda samideanaro! Por miaj 40 kursanoj mi serĉas korespondantojn en ago 18—30 da jaroj. Ĉiu ricevos certe respondon, kiu deziras korespondadi datre per il. PK kaj L. Oni skribu al Rad. Charbulak, del. de UEA, Hranice, Moravio, Ĉeĥoslovakio. [1]

Du fraŭlinoj kaj du sinjoroj el Finnlando deziras korespondi per il. PK Adreso: Fredrikink. 55-A-1, Helsinki, Finnlando. Unua l-lino, dua l-lino; unua s-o, dua s-o. [1]

Du junuloj: Wilhelm Lieberlein, 21 jara, kaj Alfred Lieberlein, 17 jara, deziras korespondi per il. PK kaj L kun la tuta mondo. Ni ĉiam respondas. Felhammer-Süd, Kurtz Str. 3, Schlesien, Germanujo. [1]

Deziras interŝanĝi PM kun samideanoj el tuta mondo. Serioza interŝanĝo: Danove Guseppe, Via Casasarzaga 28—6, Genova, Italujo. [1]

Multaj membroj de nia Asocio skribis al anoncantoj sed neniam ricevis respondon. Tial de la Esperanto Asocio Selb estas aranĝotaj korespondaj vesperoj la 30 nov. kaj 15 dec. por ricevi adresojn de veraj, seriozaj gesamideanoj. Respondojn garantias la societestro. Adreso: Hans Bayreuther, urba supra sekretario, Burgstr. 11, Selb, Bavarujo. [1]

S-o Richardo Hartmann, Hermsdorf Bez. Breslau, Bergstr. n-o 6, Germanujo, loĝas kun ĉe s-o Mangwürth, Griesen 28, Amt Waldshut in Baden, Germanujo. Kaj deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK kaj L. il. gazetojn, esperantilojn por instruado, kolekta ankaŭ PM, sed parajn kaj nefektajn kaj fotografarojn. Ĉiam respondos! Saluton al ĉiuj miaj korespondantoj kaj al Esp. Grupo „Konkordo“ en Hermsdorf, Bez. Breslau. Saluton kaj dankon al ĉiuj gesamideanoj de Germanujo, Tiroljo (Aŭstrio) kaj Svisujo; pro via bonega subteno dum mia migrado tra viaj landoj. [1]

Mikolaj Wiremiecko, pocz. Snów, pow. Nieszwieck, Iolv. Tarekij, Polujo. Kolektantoj de il. PK en ĉiuj landoj, mi sendos belegan karton de Polujo al ĉiu, de kiu mi ricevos belan karton. [1]

Poŝtmarkoj! Mi aĉetas aerpoŝtmarkojn kaj novelonitajn de ĉiuj landoj. Mi deziras pogranda interŝanĝo. Pofolle mi donas neuzitajn poŝtmarkojn de Germana Regno (aerpoŝto, provizoroj, ofico, poŝtkorno ktp.). Poŝtmarko-komercistoj ricevas, kontraŭ referencoj al mondepno, elektosendaĵojn je kvarsemajna fakturo. Kolektantoj petu senpage kaj afrankite mian piej novan prezaron pri kompletaj serioj de Eŭropo. Briefmarkenhandlung Schultze :- Köslin Germanujo. Schliessfach.

Internacia Esperanta Ludkartaro. Per tiu ĉi heraldike ornamita esp. propagandilo (12.2 : 6.9 cm) estas la plejmulto da kartludoj ludleblaj. Prezo: unu simpla ludo 4, luksa 5 sv. fr., ĉe 18 ludoj 40%o rabato, en afrankita poŝtpakaĵo de 5 kg. Postulu senpagan specimen! „IEL“ Kartcentroio Budapest, Hungarujo Poŝto 112 kesto 11.